

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 5 (20), Majo 2006

**Adreso (provizora):**  
**Esperanto Societo de Ŝikago**  
**p/a Viktor' Pajuk**  
**8228 O'Connor Dr., # 2F**  
**River Grove, IL 60171**  
**(773) 344-2276**  
**www.esperanto-chicago.org/**

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak  
Kasisto – Karlo Gunn

## Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;  
Familio \$30; Regula \$20;  
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

**Dues** are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

## Kunvenoj:

Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas la kvaran mardon de ĉiu monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Bonvenon!

Jam finbruis Paskaj festoj, proksimiĝas maj-mezo, sed ankoraŭ batalas inter si malvarmaj kaj varmegaj aer-amasoj: vintro ne cedas, somero dume ne venkis... Atenta leganto tuj menciis, ke mi saltis trans la printempon. Sed ĉiuj ŝikaganoj scias, ke tiu intersezono mankas en nia venta urbo, pli ĝuste – mankis, ĉar ĉi jare por nia E-societo primaveron donacis poeto kaj kantisto Miŝka el Rusio, kies koncerto okazis la 25an de Aprilo. Do,

## Laste okazis

S-ro Bruna Ŝtono (pseŭdonomo de Mikaelo Bronŝtejn) estas sufiĉe konata persono ne nur sur terenoj de la eksa Sovetio, sed (mi ne dubas) ĉie, kie aŭdiĝas nia kara lingvo. Li naskiĝis en Ukrainio en 1949, sed en la aĝo de 18 jaroj Mikaelo translokiĝis al Rusio por studi kaj ĝis hodiaŭ restas tie. En 1972 li finstudis elektroteknikon kaj ĵurnalismen, laboris en norda Vorkuta kaj Tiĥvin (apud Peterburgo), kie li nun estas Delegito de UEA.



Mikaelo esperantiĝis en 1962, de tiam li verkis kelkcent poemojn kaj kantojn, multaj el kiuj estis registritaj sur kasedoj kaj KDoj. Krome li originale verkis kaj tradukis pr. 15 librojn. Iam Mikaelo estis prezidanto de Sovetia Esperantista Junulara Movado, li gvidis la artajn programojn de kelkaj UK.

Kaj jen la homo kun tiu fama E-biografio atingis Ŝikagan E-societon. Mi ne priskribos la koncerton mem, anstataŭ mi tion faras ĉeestantoj de la kunveno, kiuj sendis siajn impresojn. Sed la unua telefonis al mi Tina S. sekvantmatene kaj diris nur: “Bonege! Dankon!”

La kantoj, libroj, kaj vigla parolado de Miĉjo alportis al mi la memorojn pri somero de 1965, kiam mi sola trapasadis Ruslandon kaj Siberion survoje al la UK en Tokio. Tiam Soveta Ruslando ŝajnis al mi tute senespera kaj sen-Esperanta. Mi ne konsciis, ke mi estis paŝanta tra la lando riĉa de junuloj aktivontaj en izoliteco. Ho, ili havis eĉ kaŝajn esperantistajn tendarojn, kunvenojn, pri kies okazo la eksterlando ne sciis? Kaj ili ne havis eblecon vojaĝi eksterlanden, eĉ kun Esperanto.... Sed la iama inkubatoro de la verdaj talentoj, kiel tiu de Miĉjo, evidente riĉe fruktis. La nombro de la eldonaĵoj kaj diskaj prezentitaj dum la lasta vespero multe impresis min. Gratulon al la aŭto aŭtoro kaj artisto, kun sinceraj deziroj al li de pluaj vojaĝoj kun kaj per Esperanto!

*Leszek Kordylewski*

## UTILAJ RET-ADRESOJ:

UEA – Universala Esperanto Asocio  
<http://www.uea.org>

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)  
<http://www.esperanto-usa.org/>

Free Esperanto Course on Internet  
<http://www.pacujou.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/angla/index.htm>

Internacia televido en E-o  
<http://internacia.tv>

Reta senpaga enciklopedio  
<http://eo.wikipedia.org>

Esperantic Studies Foundation  
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo  
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

Pola Radio en Esperanto:  
<http://www.wrn.org/audio/poll.ram>

## Sekvantaj kunsidoj:

**23an de Majo** – pri siaj travivaĵoj en brazilaj ĝangaloj rakontos d-ino Gertrude Novak

**27an Junio** – espereble estos farata ekskurso en “nenion” – en nigran truon. Sekvu la anoncon

**25an de Julio** – dume aliaj niaj gesamideanoj kunvenas en UK en Florenco, ni...

**Antaŭ 35 jaroj, la 30an de Septembro 1971, estis oficiale registrita “Esperanto Society of Chicago”. Salutoj estas bonvenataj!!!**

...el koncertitaj de Mikaelo Bronŝtejn la 25-an aprile plaĉas al mi kanto pri nigrablanka Vorkuta kaj precipe – kant-refaro “Adiaŭ, Parizo”.

*Gregory S. D.*

Mian opinion pri la koncerto de Mikaelo Bruna Ŝtono oni povas taksu unuvorte: mizera. Kiam mi legis la anoncon pri la koncerto mi ekspektis almenaŭ malgrandan orkestron kaj kantiston kun bela voĉo, sed anstataŭ tio mi vidis kantiston kun malforta voĉo kaj mizere akompanianta gitaro. Tamen mi admiris lian belan Esperanton!

*Walter*

... mi ege ŝatis programon de sinjoro Bronŝtejn... li parolis facile... kaj liaj paroloj kaj poemoj estis pri AMO... dolĉa afero por homoj... Dankon

*Sapideh*

Fine de la koncerto niaj samklubanoj akiris multajn librojn kaj KDojn de la gasto. Mikaelo sincere dankas al ĉiuj, kiuj helpis al li eksenti amikan etoson en nia urbo kaj afable permesis aperigi por vi la tekston de kanto *Songoj*:


En la lando de mister’	Por en nuba rozkolor’
En la blua land’	Foren en haven’
Flugas songoj nokte en	Gvidu sperta kapitan’
La fabela vant’	Ŝipon ĝis alven’.
Time, kvazaŭ birda ar’	Ludu ora sunradi’
Trans la vesperiĝ’	Kun la ond’-elan’
Por almenaŭ songe vi	Kaj junulo sentu sin
Venu al feliĉ’.	Olda kapitan’.

Iĝos revoj la real’  
En la songa lit’.  
Venas hejmen al edzin’  
Edzo de l’ milit.  
Kvardek jaroj aŭ eĉ pli  
Pasis post disiĝ’...  
Do daŭrigu songon vi,  
Lanta mateniĝ’.

## Esperanto en Usono

Ĉijare, la 21-24an de Julio, la multkultura kaj pluretna urbo Novjorko gastigos jaran kongreson de ELNA, kies temo estos *plurlingvismo*. Se vi amas Novjorkon, vi amos la ELNA jarkongreson en Novjorko! La Granda Pomo troviĝas survoje al UK en Florenco, al kiu jam aliĝis pr. 2000 e-istoj el 61 landoj, kaj la kongreso okazos tuj post Nord-Amerika Somera Kurso en Vermonto (3-21an de Julio). Vizitu: <http://www.sit.edu>.



 araneoesp @ yahoo.co.uk